# I N F O R M I L O

*Esperanta tradicio – kultura heredaĵo en Kroatio (Z-7298/2019)*

***1-2025(138) januaro ĝis marto***

***Esperanto društvo Rijeka* Esperanto Societo Rijeka***

***Blaža Polića 2 51000 RIJEKA Hrvatska-Kroatio***

Tel.++385(0)(51)334-670 lunde de la 18a ĝis la 20a horo

Naslovi na mreži-retadresoj: rijeka.esperanto@gmail.com

IBAN: HR75 2402 0061 1002 1273 9,

**Prezidanto: Emil Hrvatin tel: 091 882 2986**

**Redaktoro: Dr.sc. Ana Alebić-Juretić, dipl.inĝ. tel.: 091 563 1634**

Rijeka, la 26-an de marto 2025

Estimataj gesamideanoj!

Post iom da tempo ni daŭrigos kun eldonaĵo de *Informilo.* En tiu ĉi numero estas priskribita la fino de 2024-a jaro, kaj la komenco de la 2025a. Mi esperas ke tiu ĉi nova nume-ro kun nova estraro de la societo plaĉas al vi.

## *LA GRAVA SEMAJNO DE INTERLINGVISTIKO EN POZNANO (POLLANDO)*

Dum la semajno 08.-15.09.2024. okazis en Poznano tri gravaj kaj grandaj okazaĵoj: finekzamenoj de la lasta generacio de Interlingvistikaj studoj ĉe Adam Mickiewicz Universitato, la 38-a eldono de Arkones, kaj la plej grava: la 21-a Internacia konferenco de lingvistiko ICL2024.

### *Fino de la Interlingvistikaj studoj en Poznano*

Finekzamenoj de la lasta generacio de postdiplomaj Interlingvistikaj studoj kaj instruista trainado okazis ekde mardo, la 10a de septembro, ĝis ĵaudo, la 12a de septembro 2024. Tio estis la lasta, oka grupo kiu finis la studojn en Poznano, ĉe la Adam Mickiewicz Universitato. La grupo komenciĝis kun 41 studentoj el 21 landoj. Pro la pandemio, la instruado komenciĝis en hibrida formo unu semajnon jare en Poznano, kaj aliaj sesioj per Zoom. Dek du studentoj el 7 landoj (Ĉinio, Britujo, Koreio, Pollando, Ĉeĥio, Vietnamujo kaj Kroatio) finis la studojn per prezentado de siaj diplomlaboraĵoj pri tradukado, esperanta movado, metodiko kaj interlingvistiko. Samtempe, la unujaran studon de instruista trejnado finis kvar studentoj el Ĉinio, Serbio kaj Francio/Nederlando.

Bedaŭrinde, post 26 jaroj la Interlingvistikaj studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano fermiĝis. Fermo de la studoj estas la fino de unu erao en Esperantujo, kaj mi povas nur esperi ke la studoj ie daŭrigos. Nur tri esperantistinoj el Kroatio finis la studojn: Marija Jerković, Tea Radovanović kaj nun Ana Alebić-Juretić. Ŝi estas dankema al vorpasinta Boris De Costanzo kiu ekstra instruis ŝin kaj subtenis dirante „*Vi povas tion fari*".



*La lasta grupo de gestudentoj finfarinta la Interlingvistikajn studojn ĉe Adam Mickiewicz Univerzitato en Poznano*

Dankegon al Ilona Koutny, gvidanto, kaj al Katalin Kovacz, ne nur teknika helpanto por realigo de tiuj studoj.

### *ARKONES*

Finon de la Interlingvistikaj studoj sekvis la 38-a eldono de ARKONES, festivalo de esperanta kulturo en Pollando, kiu okazis je la 13a ĝis la 15a de septembro 2024. Tiu festivalo estis ligita al Interlingvistikaj studoj, ĉar multaj studentoj kaj profesoroj partoprenis en la programo. Krom la prelegoj, ARKONES havis plurajn laborsesojn kaj muzikan programon. Ĉi tiu jaro al kunveno aliĝis du gravaj estraranoj: Duncan Charter, prezidanto de UEA kaj Francoise Lo Jacomo, sekretario de la Akademio de Esperanto.




*Afiŝo de la lasta ARKONES*

***21-a Internacia Kongreso de lingvistoj ICL2024***

Dum la tuta semajno okazis la 21a Internacia Kongreso de lingvistoj ICL2024 ĉe la sama Universitato. Unu laborsekcio de kongreso estis dediĉita al Interlingvistiko. Interlingvistiko havas longan historion en Internaciaj kongresoj de lingvistoj, jam de la dua kongreso en Ĝenevo en 1931, kiam Otto Jaspersen traktis internaciajn lingvojn. Gvidantoj de la sekcio estis Ilona Koutny kaj Nikolau Dols, kaj la sekcio enhavis 12 prelegojn el 11 landoj.




*Interlinguistika sekcio de 21a Internacia kongreso de lingvistoj ( fotis: A. Alebić-Juretić)*

En aliaj sekcioj de ICL2024 partoprenis profesoro Ida Stria (PL), kaj studentoj Ralf Darasz (PL) kaj Ana Alebić-Juretić (HR) en la sekcio pri historia lingvistiko. Ana Alebić-Juretić prezentis sian diplomlaboron pri la fontoj de la Fiuma idiomo. Per komputila testo (60 tools) la aŭtorino trovis ke Fiuma idiomo estas unu el la lingvoj frankaoj uzata en komerco kaj trafiko sur la Mediteraneo. Fiuma dialekto mem estas unu el Venetaj dialektoj, tre simila al Triesta idiomo, kvankam malsamaj el norma Itala lingvo. Tiu ĉi laboro pruvas ke Esperanto kaj Interlingvistikaj studoj povus esti uzataj en lingvistikaj esploroj.

*(Skribis: Dr.A. Alebić-Juretić)*

### DU PRELEGOJ PRI INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ

Post reveno hejme Dr. Alebić-Juretić prelegis dufoje pri siaj Interlingvistikaj studoj:
29.10.2024. ĉe *Akademicus*, klubo de emeritiĝintaj profesoroj el Universitato de Rijeko
14.11.2024. por esperantistoj en Izola (Slovenujo)

*(A.A.-J)*

---

**Lektoro: E.D.**

### *NOVA ESTRARO DE ESPERANTO SOCIETO RIJEKA*

Fine de la 2024a jaro la mandato de la estraro finiĝis, sed la ŝanĝo al nova estis iom komplikita. La eksterordinara elekta kunveno kunvokita je la 15a de decembro 2024 falis. Pro la fino de mandato de la malnova estraro, ne sen problemoj, la nova kunvoko estis farita de 1/3 de membraro la 29-an de decembro 2024. La kunvoko estis gvidata de Dr. Ana Alebić-Juretić, kiel reprezentanto de la membraro. La nova estraro de la Societo estas: Emil Hrvatin, prezidanto, Luka Kik vice-prezidanto, kaj membroj de Prezidantaro: Pero Krstulović, Damir Morankić kaj Ana Alebić -Juretić. Bonŝancon! *(A.A.-J.)*



L*a nova prezidanto Emil Hrvatin (fotis A. Alebić-Juretić)*

### *ELSENDO AL GRADSKI RADIO TROGIR*

Jure Brkan, subtena membro de Esperanto-Societo Rijeka, organizis la prezentadon de Esperanto per duonhora elsendo en la radiostacio "Gradski radio Trogir", aktiva en la Regiono Split kaj Dalmatio. "Per la helpo de mia amiko Zdravko, ĉe la radio, ni povis fari elsendon dediĉitan al Esperanto antaŭ unu semajno (marto, red.). Dum 30-minutoj ni parolis pri la lingvo Esperanto, kion ni faras, ĝia historio. Ni ankaŭ lasis kontaktojn por ĉiu, kiu volis scii pli." Jure volis emfazi: "Mi estis la lasta membro registrita de la tiama vicprezidanto Vjekoslav Morankić kaj je lia honoro mi engaĝiĝis realigi la ideon." Tiu ĉi iniciato, libervola, kontribuis al plifortigo de la kono pri la laboro de la Rijeka societo kaj helpis disvastigi la scion kaj idealojn de la tuta movado.

(*Skribis: L. Kik kaj D. Morankić)*